


# 16ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO




La numeroj de **Boletin** de la lastaj monatoj de 1954 kaj tiuj de 1955, antaŭ la Kongreso en Gijón, sufiĉe anoncis tiun eventon. Jam en la numero de majo de la antaŭa jaro estis publikigita artikolo pri Asturio verkita de Adonis G. Meana, el la E-grupo La **Verda Kolombejo**. Notindas ke en la anoncoj de la bulteno de **HEF** pri la Loka Kongresa Organiza Komitato oni indikis jenan adreson:

**16ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO**
**23 – 27 de Julio de 1955**
**Adreso de la Organiza Komitato: Grupo Esperantista del Centro Asturiano**
**Paseo de Begoña, 26-28, GIJÓN, Asturias**

Tio ŝajne indikas ke fine la tiamaj samideanoj de nia urbo donis al si ian organizan strukturon, sed la afero estis iom pli komplika. Fakte, ekde kelkaj monatoj antaŭ la kongreso, tiu E-grupo de la Asturia Centro de Havano jam ne plu ekzistis. En la sekva ĉapitro ni montros la organizajn sorto-ŝanĝojn travivitajn de la esperantistoj de Gijón en tiu epoko, ĝis la definitiva fondiĝo de stabila E-rondo en ĉi tiu urbo.




La membroj de la Organiza Komitato estis: Prezidanto: ***Alfredo Villa González***; Sekretarioj: ***Alfredo Villa Villa*** kaj ***Alberto Menéndez González***; Fakuloj: ***Nicanor García y García***, ***José Palacio Tuero***, ***Juan Fernández Rodríguez***, ***José Manuel Paraja***, ***Florencio Villa García***, ***Salvador García y García***, ***Dimas González Argüello***, ***Manuel Blasco Chico***, ***José Fernández Álvarez***, ***Luis García***, ***Alcibiades González Meana***, ***Adonis González Meana***, ***Manuel Gutiérrez***, ***Juan Manzano Bartolomé*** kaj ***Francisco Ignacio Taibo***. En tiu listo estas esperantistoj el la diversaj E-grupoj iam ekzistintaj en Gijón kaj ankaŭ kelkaj samideanoj el la aliaj astura E-grupo tiam ekzistanta, **La Verda Kolombejo**.

La Prezidanto, Alfredo Villa González estis filo de Alfredo Villa Villa, kiu estis la vera ĉefa prizorganto, kune kun Alberto Menéndez, de la Kongreso kaj de la E-movado en Gijón. Ambaŭ aktivuloj rolis kiel sekretarioj de la Kongreso.

Ampleksan raporton pri la Kongreso oni povas legi en la **Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo** kaj ankaŭ en la numero 80a de **Boletin** de **HEF**. Neniu el tiuj fontoj komunikas la nombron da aliĝintoj kaj partoprenantoj en la Kongreso; nur oni informas ke estis malpli ol en la Kongreso de la antaŭaj jaroj. Per la foto de la kongresanaro, kiun ni prezentas sur la sekva paĝo, oni povas konstati ke estis preskaŭ ducent personoj… multe pli ol en la nuntempaj landaj E-kongresoj.

Tralegante la menciitajn raportojn oni povas konkludi ke la Kongreso en nia urbo estis brila kaj kontentiga por la ĉeestantaro. La urbaj kaj provincaj aŭtoritatoj bone kontribuis al la sukceso de la evento.

La solena Malfermo de la Kongreso okazis en la Teatro Jovellanos, kaj la kongresaj laborsesioj estis en la Liceo Jovellanos. Dimanĉe, la 24an de julio estis meso en la preĝejo Sankta Petro, kun prediko en Esperanto de pastro Casanovas. Tiutage estis vizito de la gekongresanaro al la Labora Universitato. Tie estis farita la kongresa foto.

Inter la kutimaj programeroj de ĉiu kongreso de Esperanto estas menciindaj ĉi kaze la t. n. **Literatura Festo**, beletra konkurso, en kiu oni konkuris per altkvalitaj verkoj. Estis premioj pro Originala Poezio, Prozo Originala, Poezia traduko kaj Prozo Tradukita. La unuan premion en Originala Poezio atingis S-ro Francisco Vilá, el Barcelono, pro lia poemo **Medalo**, kiun ni prezentas sur la apuda paĝo.